

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 315 (82) KVINA EPOKO

MARTO-APRILLO 2001



DU BILDOJ DE NIA ĈI-JARA KONGRESURBO

ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL  
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio  
per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj  
Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuoj *Esperanto*, Kontakto kaj libroj), FEL  
(revuo *Monato* kaj libroj), IKEL, *Literatura Foiro*, *Heroldo*, *La  
Kancerkliniko*, *La Ondo de Esperanto*, *Litova Stelo*, *Scienca  
Revuo* (ni peras ankaŭ aliajn revuojn)

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)  
Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde  
lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

Ret - adreso: [kea@stel.net](mailto:kea@stel.net)

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 2001: Individua Abonanta Membro 3.500  
p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua  
Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj;  
Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència  
461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Neus Moly;  
vicprezidanto: Josep Franquesa; kasisto kaj provizora  
sekretario: Llibert Puig; komitatanoj: Mercè Porta, Roger  
Prieto, Anna Casasús.

Kontrola Komisiono: Miquel A. Altuna, Arnald Massanas,  
Lluís Armadans.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé.  
Revizianto: Hèctor Alòs i Font.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre  
esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj  
ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080  
Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91  
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

## 30-a KATALUNA KAJ 3-a TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO

Kiel promesite ni kunsendas la aliĝilon por nia  
ĉi-jara Kongreso. Pliajn informojn ni aperigos  
en nia venonta revuo. Vidu frontpaĝe bildojn de  
Ĝirono, nia ĉi-jara kongresurbo.

## ĈE NIAJ NORDAJ NAJBAROJ

**Staĝo en Agde** okazos de la 19-a ĝis la 26-a  
de majo. Informojn volonte donos al vi:  
Christian Herbertte, Domaine des 7 Fonts, FR-  
34300 AGDE -tel.33-0467218661.

**Amika Semajnfina Renkonto** okazos la 16-an  
kaj 17-an de junio en Les Sagnes, pitoreska  
vilaĝeteto, proksime de Olargues (34), ĉe niaj  
gesamideanoj Henryka Olek kaj Gérard Paing.  
Informiĝu ĉe la tel/fakso 33-0467977910.

**Tuluzo.** Informoj pri la loka kultura centro  
(EKC) estas troveblaj sur la reto (pri la lokaj  
radioelsendoj, la komunaj manĝoj, la kursoj kaj  
lingvaj semajnfinoj). La Federacio havas novan  
estraron: J.Cash estas la prezidantino,  
C.Lavarenne la sekretario kaj F.Martorell la  
kasisto. Ĝi planas cirkuleron ĉiun trimestron.  
En majo EKC rezervis tagon por konigi E-on,  
inter la tago de Eŭropo (9/5) kaj la forumo de  
lingvoj (20/5).

La bulteno "La Krokodilo" mencias la venontajn  
manĝo-klaĉojn de la 6/4, 4/5, 1 aŭ 8/6 kaj  
raportas kun koloraj fotoj pri la preparado de  
filmo fare de staĝanoj de Arrout.  
La loka televido TLT akceptis 4 esperantistojn  
por 25-minuta elsendo "Memoro" pri la temo E-  
o la 12-an de marto. Intervenis C.Lavarenne  
(historio), M.Lafosse (fervojistoj), F.Martorell  
(muziko), JM.Cash (Pasporta Servo kaj la  
movado). Fine oni ekparolas pri projekto de  
festo por Novjaro.

**Manuel Cos i Serra**, barcelona membro  
de nia asocio, forpasis en la jaro 1999, laŭ  
ĵusa ricevita informo de najbarino lia.

**Kiril Velkov** forpasis en la aĝo de 56  
jaroj. Kiril estis doktoro pri fiziko, profesia  
astronomo, elstara pedagogo, sed ĉefe  
milda bonkorulo, sprita kunbabilanto kaj  
roke firma apogo por siaj amikoj. Ekster  
Bulgario kaj Ukrainio, kie li studis kaj longe  
loĝis, li estis ĉefe konata pro la du volumoj  
de la krestomatia "Ek' al leg'" kaj la  
vortareto "Tabuaj vortoj en esperanto".  
Tiuj, kiuj havis la bonŝancon persone koni  
lin, estas pleje trafitaĵoj. (Hèctor Alòs i Font)

**Carme Argemi i Suana**, vidvino de nia  
pioniro Delfi Dalmau, forpasis la 13-an de  
aprilo, estante 96-jara. Al ŝiaj gefiloj Delfi  
kaj Maria-Eugènia kaj ceteraj familianoj iru  
nia plej sincera kondolenco.

## Unua Premio "Delfí Dalmau" por gazeta artikolo

### REGULARO

- 1.-Oni aljuĝos ĉi tiun premion al la plej bona populariga gazeta artikolo kiu pritraktos ajnan aspekton en rilato al la ekologio de la lingvoj, la lingva (mal)egaleco, la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj, aŭ la ebla aŭ fakta kontribuo de internacia lingvo kiel Esperanto sur ĉi tiu kampo.
- 2.-Oni rajtas prezenti konkursaĵojn en la kataluna kaj/aŭ en Esperanto. Ĉiu partoprenanto rajtas prezenti tiom da tekstoj kiom oni deziras. Ili estos neeldonitaj kaj en ili oni mencias fakton aŭ studon diskonigitan dum la kuranta aŭ dum la pasinta jaro.
- 3.-La tekstoj ampleksos minimume tri kaj maksimume kvar foliojn DIN A4, tajpitajn je duobla spaco, kun 24 linioj ĉiupaĝe kaj 65 karaktroj ĉiulinie aŭ je simila amplekso. Oni liveros ilin kvinoble, aldonante surdisketan aŭ informadikan kopion
- 4.-La monsumo de la premio estos 300 eŭroj. La teksto aperos en diversaj periodaĵoj, ĉu katalunlingve ĉu esperantlingve.
- 5.-La personaj aŭtoraj donitaĵoj (nomo, adreso, telefonnumero, loĝloko kaj eventuale ret-adreso) estos kunsenditaj en aparta fermita koverto, sur kiu legeblas la titolo de la prezentita verko kaj, laŭdezire, pseŭdonimo aŭ devizo.
- 6.-La limdato por la akcepto de originaloj estos la 15-a de aŭgusto 2001. Oni sendu ilin poŝte al la adreso: c/ Tossalet,4 ES-25460 Cervià (Lleida) Katalunio, indikante sur la koverto: Por la 1-a Premio "Delfí Dalmau"
- 7.-La ĵurion de la 1-a Gazeta Premio "Delfí Dalmau" konsistigos la jenaj personoj: Jordi Solé i Camardons, Luz Vázquez, Hèctor Alòs kaj Abel Montagut, kiuj povos interkonsente proponi aliajn ĵurianojn ĝis maksimumo de sep personoj. La decidoj de la ĵurio estos neapelacieblaj. La ĵurio rajtos deklari ĝin nealjuĝita, se ĝi konsideros tion oportuna.
- 8.-Oni proklamos la rezulton en la kadro de la Kataluna Kongreso de Esperanto en Girona, dimanĉon la 14-an de oktobro 2001.
- 9.-Kataluna Esperanto-Asocio rezervas al si la rajton publikigi, aparte aŭ kune en unu sola volumo, la konkursaĵojn kiuj superis la unuan fazon de la aljuĝo de la premio akorde kun ĝia specifa aljuĝa regularo, t.e. la verkojn al kiuj oni atribuis tri aŭ pli da poentoj super kvin en la komuna kvalifiko de la ĵurio.
- 10.-La partopreno en la premio implicas la akcepton de ĉi tiu regularo.

# NIA AGADO

## ASEMBLEAJ RAPORTOJ

Ĝenerale la homoj ne emas kunveni kaj des malpli assemblei, tamen 20 membroj de nia asocio kuniĝis por plenumi la ĉiujarajn bilancojn agadan kaj ekonomian, la 3-an de marto ĉe la Unesko-Klubo en Barcelono.

Elstaras la ekonomia bonstato de nia asocio, kio laŭ la opinio de la kasisto estas simptomo de asocia malagemo. Tion pruvas la agadraporto, kie oni mencias plurajn aranĝojn plenumitajn de aktivuloj kaj de estraranoj sed nur je loka nivelo. Kiel escepton ni menciis la organizan renkontiĝon okazintan en surmontara restadejo.

Reage al la kunlabora peto de la estraro, Abel Montagut proponis starigon de Eseo-Premio "Delfi Dalmau", honore al nia karmemora pioniro, por gazeta artikolo pritraktanta ajnan aspekton en rilato al la ekologio de la lingvoj, la lingva (mal)egaleco, la Universala Deklaracio de Lingvaj Rajtoj aŭ la ebla aŭ fakta kontribuo de internacia lingvo kiel Esperanto sur ĉi tiu kampo. Ĝian verdikton oni eldiris dum nia ĉi-jara kataluna kongreso. Ankaŭ Luz Vazquez proponas la organizon de fakaj kunvenoj pri reklamado (informado), lingvo-praktiko (konversacio). Ambaŭ sugestojn la estraro pritraktos dum sia venonta postassemblea kunveno.

Oni emfazas la bezonegon havi decajn informilojn kaj Hector Alòs sin proponis kiel redaktonto surbaze de estrara plano pri celotaj informotoj.

La estraro informis pri la plenumitaj kongresaj preparlaboroj kaj proponas du kongrestemojn. Aprobiĝas la jena: "Migrado kaj lingvoj".

Pri la estrarŝanĝo prezentiĝas escepta situacio pro la fino de la sekretaria mandato kaj la rezigno de tri estraranoj antaŭ la fino de iliaj mandatoj. Memkompreneble la estraro krizas. Ĉar neniu nova kandidato prezentiĝis dum la Asembleo, ni alvokas la membrojn al kunlaboro. Volontuloj estos bonvenaj ĉu por plenumi vakantan estrarpostenon, ĉu por konkretaj laboroj.

Aparte prezentiĝas en tiu ĉi sama revuo kaj la spezkonto kaj la bilanco por la finita jaro 2000, kiujn la Asembleo unuvoĉe aprobis surbaze de la rekomendo de la Kontrola Komisiono.

Sekvis la anoncita Eksterordinara Asembleo kun unu sola punkto en la tagordo: Aprobi la aliĝon al la fondota Kataluna Esperanto-Federacio (KEF).

Ĉar CES (Centro de Esperanto Sabadell) ne akceptis en sia asembleo, okazinta en la antaŭa vespero, la proponon fariĝi kunfondota membro pro malklara vortumado de la celoj de KEF, la Asembleo opinias ke la tuta afero ankoraŭ malmaturas kaj, dum oni studas ĝin pli bone, la propono restu frostigita.

## ST.ANDREU DE LA BARCA

Laŭ propono de Narcís Fluvià, nia prezidantino Neus Moly prelegis en tiu urbeto la 6-an de aprilo pri "Esperanto al segle XXI" (Esperanto en la 21-a jarcento) kaj oni prezentis ekspozicion en la biblioteko de la loka Kultura Centro Aigüestoses inter la 6-a kaj la 27-a de aprilo.

## REUS

Jen foto kun la gelernantoj de nia aktivulino Luz Vazquez en la Civitana Centro Ponent dum la ĉi-jara E-kurso. Ili spektas la instruan Mazi-filmon.

Ni gratulas nian samideaninon Luz pro la dua premio, kiun ŝi gajnis en la Tria Internacia Fotokonkurso organizita de La Ondo de Esperanto.



## INTERNACIA VIRINA TAGO

Laŭ sugesto de nia membro Lluís Aragay, nia asocio sin turnis al japana samideanino Taeko OSIOKA el Hiroŝimo, kiu petis internacian kunlaboron al esperantistoj por

interŝanĝo de salutoj okaze de la Internacia Virina Tago. Nia asocio kun la kunlaboro de Centro de Esperanto Sabadell sukcesis interesigi 6 virinajn grupojn el sindikatoj kaj kvartalaj asocioj, kiuj redaktis jenan saluton por la hiroŝimaj virinoj:

*"La virinaj grupoj de Sabadell en Katalunio (Hispana Ŝtato) ankaŭ memorigas la 8-an de marto per diversaj aranĝoj. Ĉi-jare nia devizo ligiĝas al la sugesto de la eŭropaj virinaj organizaĵoj de la Platformo pri la Monda Marŝo de Virinoj, tio estas: "La malriĉeco, alia formo perforti" Ni deziras ke la solidareco disvastiĝu kaj ke ĉiuj popoloj vivu en paco kaj demokratio. Koran saluton al la virinoj de Hiroŝimo"*

El Hiroŝimo ni ricevis jenan interŝanĝan saluton:

*"En la nomo de hiroŝima gubernia kunveno de Internacia Virina Tago ni elkore salutas vin. Kiam ni havas la tagon en Hiroŝimo, anoncas printempon floro de mimozo ĉe la Paca strato. En kiaj sezonoj kaj vivo vi havas la tagon? Ni havas kunvenon vespere en la 8-a de marto sub la slogano "21-an jarcenton por observi la konstitucion, realigi pacon kaj homajn rajtojn"*

*Programo de la kunveno estas:*

1).-*"Mi deziris defendi vivon de mia filo". Paroloj pri Karosi sinjorino venkinta en proceso kontraŭ saŭca kompanio en Hiroŝimo, kiu troe laborigis ŝian filon kaj li sinmortigis.*

2).-*Minikoncerto de violonistino.*

3).-*Raportoj de aktivecoj de aliĝintaj organizoj.*

*Nun japana ekonomio daŭre stagnas en malprospero. Malaltigo de salajro, maldungo ĉe grandaj entreprenoj kaj municipoj iĝas severaj. La nombro da senlaboruloj superas tri milionojn.*

*Ankaŭ en Hiroŝimo aŭtokompanio Mazuda fermos parton de siaj fabrikoj kaj maldungos 1800 laboristojn. Same severe en aliaj laborejoj, lernejoj kaj hospitaloj.*

*Al ni, virinoj el Hiroŝimo, ne akceptebla estas la fortiĝo de reakciuloj rekonsideri la japanan konstitucion, cele la 9-an artikolon,, kiu deklaras ,ke ni ne posedas militpovon kaj ne agnoskas militrajton de la regno. Ni observas la konstitucion kaj kune vivos kun vi en paco*

*sen nuklea armilo sur la terglobo. Al vi ĉiuj fruktoplennan sukceson deziras via,*

*S-ino NOBUMASA Tiekō, reprezentante la komitaton de la hiroŝima gubernia kunveno de Internacia Virina Tago 2001.*

*Kunlabore de filioj de: Nova Japana Virina Asocio; Japana Patrino Ligo; Virina Demokrata Klubo kaj virinaj sekcioj de filioj de: Tutlanda Instruista Sindikato; Federacio de Medicinaj Sindikatoj; Komerca kaj Industria Federacio kaj Emerita Kooperativo."*

(sur la foto s-ino Osioka prezentas la 30 mesaĝojn el 17 landoj. Maldekstre sur muro



oni vidas la mesaĝojn kaj aparte ĉiuj 110 partoprenantoj ricevis ilin en presita formo).

## SABADELL

Kiel anoncite, vizitis nin la usona samideano Henry Studer, kiu kunlaboris sukcesigi la babilejon okazintan la 11-an de aprilo en nia sidejo. Krom lokaj gesamideanoj, ĉeestis ankaŭ esperantistoj el Barcelono kaj Terrassa.

En la nova telefonlisto aperas nia grupo sub la nomo Esperanto-Centro Sabadell, kio faciligos la aliron de neesperantistoj al nia grupo.

## INTERNACIA TRADUK-KUNLABORO

Laŭ peto de s-ro Cirilo Pinardon, franca reprezentanto de BEMI (Biciklista Esperantista Movado Internacia) kaj fakdelegito de UEA pri biciklado, ni tradukis al la kataluna la regularon de la biciklista klubo "La Cent-Montpaseja Klubo" (Club dels Cent Ports de Muntanya). Li sukcesis krei E-rubrikon en tiu klubo konsultebla ĉe: [http://horizonto.free.fr/ccc\\_ct.htm](http://horizonto.free.fr/ccc_ct.htm)

# NIA AGADO

## SPEZOKONTO DE KEA DUM 2000

### ENSPEZOJ

Membrokotizoj	598.250'—
Kotizoj 2000 Dumvivaj Membroj	20.450'—
Libroservo	80.575'—
Perado revuoj + UK	699.029'—
Aranĝoj	70.216'—
Vendo fotokopioj	5.385'—
Fondaĵo komputilo	2.300'—
Subvencio FOCIR	9124.000'—
Helpo pola esperantistino	30.000'—
Bankaj interezoj	675'—
	<hr/>
	1.631.680'—

### ELSPEZOJ

Administrado	64.553'—
Aranĝoj	94.675'—
Sidejo	60.000'—
Libroservo	65.638'—
Perado revuoj + UK	716.451'—
Kataluna Esperantisto	212.103'—
Monsendo pola esperantistino	30.000'—
Bankaj kostoj	39.555'—
PROFITO	348.705'—
	<hr/>
	1.631.680'—

## BILANCO DE KEA JE 31.12.2000

### AKTIVO

Kuranta kaso	79.713'—
Konto Ŝparkaso	702.681'—
Libroserva stoko	59.549'—
Eldonejo Sirius	2.163'—
Enspezotaj kotizoj	58.100'—
Komputilo (82368-27456 amortizo)	54.912'—
Fotokopiilo (78.000-26000 amortizo)	52.000'—
	<hr/>
	1.009.250'—

### PASIVO

Asocia bonhavo	131.605'—
Dumvivaj Memboj (120150-20450)	99.700'—
Pagotaj KEJ-kotizoj 98+99+00	75.225'—
Debeta saldo ĉe UEA	74.396'—
Patronaro P.Nuez	257.119'—
Fondaĵo komputilo	22.500'—
PROFITO	348.705'—
	<hr/>
	1.009.250'—

## BRUSELA OFICEJO

En la pasinta novembro okazis kunveno en Roterdamo ĉe la Centra Oficejo de UEA de eŭropaj E-aktivuloj. Unu el la ĉefaj temoj estis la propono starigi en Bruselo Oficejon de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU)

Poste la temo estis longe kaj vaste debatata per e-poŝta korespondado inter la EEU-aktivuloj, kaj esploroj estis surloke faritaj, pri kostoj kaj eblecoj. La Oficejo povus funkcii kiel oficiala sidejo de EEU kaj samtempe kiel oficejo de la Laborgrupo pri la lingva problemo en Eŭropo. La oficejo povus starti je ia difinita minimuma nivelo, por kreski poste laŭ la kapabloj kaj la necesoj.

Sed la bazo de ĉio estas financado.

Do ni eliru el la diskutoj kaj komencu konstrui.

La estraro de EEU alvenis al la decido lanĉi la ĉi suban alvokon.

## ALVOKO : NI KONSTRUU!

Komence de la venonta jaro ekcirkulos en dek du landoj de la Eŭropa Unio samaj monbiletoj kaj samaj moneroj. Tio konkrete montros, kiom multe nia ĉiutaga vivo, de ni civitanoj de EU, estas ligita al komunaj institucioj.

Ankaŭ ni, eŭropaj esperantistoj, estos pli kunligitaj. Kaj tio pli bone montras la neceson de komuna Esperanto-agado en Eŭropo. EEU celas ĝuste tion, nome antaŭenigi komunan agadon. Por ke la Esperanto-agado eŭroponivela estu pli efika, estas necese, ke EEU estu videble reprezentata tie, kie la ĉefaj organoj de Eŭropa Unio troviĝas, nome en Bruselo.

La EEU-estraro decidis provi starigi EEU-oficejon en Bruselo, kiu ebligu pli rektajn kontaktojn kun la ĉefaj eŭropaj instancoj, t.e. la Komisiono kaj la Parlamento, kaj zorgu informadon de la tre multaj ĵurnalistoj ĉiulandaj kiuj laboras en la "Eŭropa ĉefurbo".

Minimуме tia oficejo, kiu devus esti ankaŭ la oficejo de la Laborgrupo pri la Eŭropa Lingvoproblemo, devus funkcii almenaŭ tri duontagojn semajne kun unu deĵoranto; pli ambicia celo estas atingi plentempan funkciadon kun salajrata persono plus unu aŭ pluraj helpantaj aktivuloj.

La ĉefa problemo estas la mono. Francoj diras ke "estas la mono tio, kio faras la militon", kaj tio validas ankaŭ por nia paca batalado.

Por certigi longedaŭran agadon de la oficejo, oni bezonas havi kapitalon, kies rento kovru la kostojn de la oficejo.

Ĉu eŭropaj esperantistoj kapablos realigi tion? Jen valora defio!

La estraro de EEU lanĉas alvokon al ĉiuj eŭropaj esperantistoj, al ĉiuj kiuj konscias pri la graveco de la eŭropa agad-kampo por la sukceso de la internaci-lingva ideo, al la landaj asocioj, al la internaciaj Esperanto-organizaĵoj, por ke ili kontribuu al starigo de "Fondaĵo Eŭropo", en konto ĉe UEA.

Provizore, dum la formala starigo-procedo de la Fondaĵo, vi rajtas sendi viajn kontribuojn al la konto eece-p de EEU ĉe UEA, indikante la celon, t.e. "Brusela Fondaĵo".

La fondaĵo estos estrata de la EEU-estraro kaj ĉiuj kontribuoj estos diskonigataj pere de tiu ĉi bulteno kaj de la Esperantaj informiloj.

Ĉiu kontribuanto ricevos tiun ĉi bultenon ankaŭ en papera formo, sen plia pago.

Do, sciigu al ni ĉu Eŭropo estas vere grava por vi.

Investu en Eŭropo!

Ni atendas ke ĉiu landa asocio iniciatu kolektadon inter siaj anoj kaj forte apogu ĝin.

Dankon!

La prezidanto de EEU

Umberto Broccatelli

(el Eŭropa Bulteno n-ro 12, sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo)

Jen rubriko, kiu krom recenzoj, inkludos informojn pri novaj ricevitaj libroj, aĉetebraj en nia libroservo.

## “Malvivaj animoj” en Esperanto

Libroserio *Oriento-Okcidento* estas la plej konata kaj longedaŭra eldonprojekto en Esperantujo. En ĝi aperas aparte gravaj kaj reprezentaj verkoj de la nacilingvaj literaturoj de diversaj landoj en la Okcidento kaj la Oriento. Verkoj de Dante, Shakespeare, Kafka kaj Márquez najbaras kun tiuj de Mori Oogai, Chun-Chan Yeh kaj Tagore. La serio prezentas ankaŭ la spiritajn riĉaĵojn de verkoj religiaj, mitaj kaj folkloraj, entenataj en *La Nobla Korano*, *Kalevala*, mondpoesia antologio *Tutmonda sonoro*.

La malcentra funkciado de la serio ebligis partoprenon de diversaj eldonejoj kaj eminentaj tradukistoj. La talento de William Auld, Fernando de Diego, Kálman Kalocsay, Konisi Gaku, Miyamoto Masao, Sergio Pokrovskij kaj de aliaj majstroj, multiplikita je la valoro de la verkoj, konsiderinde kontribuis al evoluo de nia literatura lingvo.

Ĝis 1991 la rusan literaturon reprezentis nur *Elektitaj fabloj* de Ivan Krilov (1979). Sed en la 1990-aj jaroj *Sezonoj* riĉigis la serion per *La majstro kaj Margarita* de Miĥail Bulgakov (tradukis Sergio Pokrovskij) kaj *Krimo kaj puno* de Fjodor Dostojevskij (tradukis Andrej Parfentjev). Nun la rusa literaturo definitive ricevas dignan lokon en *Oriento-Okcidento* per *Malvivaj animoj* de Nikolaj Gogol.

Puŝkin en 1835 donacis al Gogol la ideon pri la intrigo, el kiu Puŝkin intencis fari poemon. Kaj Gogol difinis la ĝenron de sia ĉefplenumo *poemo*; supozeble li estis inspirita de Puŝkin: *Eŭgeno Onegin* estas neproza romano, kaj *Malvivaj animoj* neversa poemo.

Gogol planis tri volumojn. La unuan parton li konsideris malpli grava ol la du verkotaj: “Kompare al ili ĝi ŝajnas al mi simila al perono, haste farita de provinca arĥitekto al palaco, kiu estas intencita kiel kolosa konstruaĵo”.

La laboro pri la dua volumo daŭris, kun paŭzoj, dum dek jaroj, sed la manuskripton de la redaktita teksto Gogol forbruligis, kaj post naŭ tagoj lia vivo finiĝis. Estis trovitaj nur kelkaj malnete verkitaj kajeroj, hazarde falintaj post librojn en la ŝranko. La tria volumo eĉ ne estis komencita. Laŭ kelkaj indikoj, ĝia intrigo devus disvolviĝi en Siberio...

Sed jam la unua volumo fariĝis klasikaĵo, unu el la plej fierindaj verkoj de la rusa literaturo. Jam dum la vivo de la aŭtoro la kritika literaturo pri *Malvivaj animoj* multoble superis la amplekson de la teksto mem. La figuroj de la protagonistoj metaforiĝis. Aperis pluraj teatraj kaj kinofilmaj versioj de la poemo en Ruslando kaj eksterlande, televida filmo kaj eĉ opero de Rodion Ŝĉedrin (1976).

La poemo estas tradukita al pluraj lingvoj, nun ankaŭ al Esperanto. La eldonejo *Sezonoj* kaj la tradukinto, Vladimir Vyĉegjanin, opinios sian celon plenumita, se en Esperantujo oni parolos pri iu avara kiel Puŝkin, mensogema kiel Nozdrjov, malsprita kiel Koroboĉka aŭ pri Ĉiĉikoveskaj projektoj.

La libro estas fortike bindita kun jako (kromkovrilo) de Maria Baĵenova (simile al *Resurekto*).

Aleksander Korĵenkov (El La Ondo de Esperanto 3/2001)

(aĉetebla ĉe KEA .Prezo 3.000 p-toj )

## Paŝoj al plena posedo de William Auld

Grafike moderna, didaktike aktuala. La fama perfektiga libro de W.Auld, de li reviziita kaj plene aprobata en sia tutnova aspekto: klara litertipo kaj amuzaj bildoj, fine povos kontentigi la petojn de la atendantoj. Nova, freŝa aero en la kursoj kaj hejme!

(aĉetebla ĉe KEA. Prezo 2.000 p-toj )